Jaro VI. Septembro, 1924. Numero 1.

BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO:
por Bulgarlando 30 levoj, por fremdlando: bonvalutaj 60 lv., malbonvalutaj 40 levoj.

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

АБОНАМЕНТЪ:
за България 30 лв.
Обявления: кв. см. 2 лева
Отделенъ брой 3 50 лева

Препоржчано отъ М-о Н. Пр. за учил. библ. съ окр. № 1870 отъ 27. I. 1922

En la komenco de la jaro.

„Bulgara Esperantisto" denove aperas antaŭ siaj legantoj en sia modesta vesto, kiel ĝis nun.

Certe, multaj atendis vidi realigita la projekton pri kreo de du gazetoj — „Balkana Revuo", kiel pure esperantlingva organo de ĉiuj balkanlandaj esperantistaroj, kaj ĵurnalformata propaganda „Bulgara Esperantisto", aperanta pli ofte. Kaj la nuna kajero de nia organo mirigos ilin.

La kongreso lasis la solvon de la demando pri la estonteco de nia presorgano al la Centra Komitato.

La Centra Komitato esploris la cirkonstancojn, kaj konstatis, ke la momento por realigi la projektitan planon ne estas ankoraŭ tre oportuna. Oni povis kompreni, ke la samideanoj en Rumanio kaj Jugoslavio, kie nun estas serioza Esperanto-movado, ne estas ankoraŭ sufiĉe pretaj por partopreni en simila iniciato. Ili ankoraŭ estas en la periodo de sia interna organizo kaj antaŭ ili aperas konkretaj lokaj taskoj, kiuj okupas ilian plenan atenton.

Konsiderante ĉion, la Centra Komitato trovis, ke almenaŭ nun ni devas daŭrigi la sekvatan kaj provitan vojon. Antaŭ ni staras nur unu ebleco: plioftigi la aperadon de la gazeto aŭ pligrandigi ĝian amplekson. Tio tamen dependos de la kvanto de l'abonontoj. Do, la solvo de tiu demando estas en la manoj de la tuta bulgara esperantistaro. Se la samideanoj klopodos disvastigi ankoraŭ pli multe nian gazeton, ili venigos baldaŭ ĝian pliampleksigon aŭ plioftigon.

Koncerne la enhavon de la gazeto kaj ĝian redaktadon, ni esperas, ke ĝi ankaŭ konstante pliboniĝados. Du junaj kaj agemaj membroj freŝigas la redaktan komitaton; ni kredu, ke ili enfluigos senteblan pliviglígon. Cetere la enhavo de la gazeto dependas plejparte de la kunlaborontoj, kaj ni invitas ĉiujn spertajn samideanojn, kiuj okupas sin per verkado kaj tradukado, doni sian kunhelpon, liveronte abundan materialon por ĉiuj fakoj de la gazeto, por ke la redakcio povu fari elekton.

Do, kun unuigitaj fortoj, kuraĝe kaj ageme kiel ĝis nun, ni enpaŝu la sesan jaron de „Bulgara Esperantisto"!

Ada.

La laboro de la XI Bulgara Esperanto-Kongreso.

Malferma kunsido.

La kongreso estis malfermita dimanĉe, la 27. de julio, en la salono de „Moderen Teatr" de la prezidanto de Bulgara Esperantista Societo S-ro Georgi Aktarĝiev per malmultaj, sed konvenaj vortoj.

La kongreson salutis:

S-ro Henriko Fiŝer (Bukureŝto) je la nomo de la Rumana Ministerio de Komerco kaj Industrio, kaj ankaŭ de la Rumanaj Esperantistoj;

S-ro D-ro W. Kenn (ĉina profesoro);

Pastro Andreo Ĉe;

S-ro Tiberio Morariu;

La Urbestro de Ruse;

Reprezentantoj de lokaj kulturaj organizaĵoj.

Estas elektita kongresa estraro en jena konsisto: prezidanto Stefan Uzunov (ŝtata advokato en Ruse); vicprezidantoj: Ganĉo Ĵeljazkov (Gorsko-Slivovo) kaj Pastro Georgi Hristev (Popovo); sekretarioj: Boris Panĉev (Sofio), Asen Grigorov (Sofio), Veselin Gerĝikov (Ruse) kaj Vasil Cankov (Pleven).

Kiel honoraj vicprezidantoj de la kongreso estis proklamitaj S-roj H. Fiŝer, D-ro W. Kenn kaj pastro A. Ĉe.

La kongreso elektis ankaŭ komisionojn pri: kontrolo de la rajtigiloj, buĝeto, ŝanĝoj en la statuto.

La kunsido fermiĝis en la 13 h.

1. Labora Kunsido (28. VIII. 1924. atgm.).

La prezidanto (Ĵeljazkov) legas saluttelegramojn el Italio, Meĥomia, Sliven, Kazanlik, Split (Jugoslavio), Stara-Zagora k. a. La kongreson salutas ankaŭ la loka virina bonfara societo.

S-ro P. Kolev raportas pri la delegitoj: ili estas 90, en tiu ĉi nombro 31 neregulaj. La kongreso post voĉdono akceptas ilin kiel regulajn.

La sekretario de B. E. S. D. Simeonov legas la jarraporton.

La prez. invitas la Kontrolan Komitaton, ke ĝi legu sian raporton. Evidentiĝas tamen, ke neniu ano de la komitato ĉeestas, kaj ke kontrola raporto entute ne estas skribita. Tumulto kaj protestoj. La kongreso rezolucias akran riproĉon al la Kontrola Komitato pro neplenumita devo.

Oni pridiskutas la rilatojn inter B. E. S. kaj la Esp. Koopera Societo. Kelkiuj deziras, ke la Koopero ne estu privata entrepreno, kvankam esperanta, sed ke ĝi fariĝu fako eldona de B. E. S.

D. Simeonov, At. D. Atanasov k. a. klarigas, ke tio estas neebla, ĉar la leĝoj de nia lando malpermesus nun tian ŝanĝon de la aferstato; kompetenta estas en tiu ĉi okazo la Koopero mem, kiu en sia jarkunveno dum dec. 1924. rajtos decidi pri sia sorto. Alvokas la samideanojn aliĝi al la koopero kiel samrajtaj membroj por povi influi ĝian disvolviĝon.

La kongreso, post longa diskutado, rezolucias rekomendi la kooperon al la samideanoj kaj inviti ilin, ke ili aliĝu al ĝi.

Post voĉdono la jarraporto estas aprobita.

La kongreso deziresprimas, ke la Kontr. Komitato en nelonga templimo preparu kaj prezentu sian raporton.

Per aplaŭdo oni aprobas telegrame saluti la Rumanan ministron de la komerco, oficiale deleginta al la XI B. E. Kongreso, kiel sian reprezentanton, s-ron H. Fiŝer, kaj ankaŭ s-ron profesoron Ŝiŝmanov.

2. Labora kunsido (28. VIII. 1924. ptgm.).

D-ro profesoro Won Kenn adiaŭas per varmaj vortoj kaj bondeziroj. Bruega, netrankviliĝanta aplaŭdo lin akompanas ĉe lia foriro.

La tagordo koncernas la estontan agadon.

Balkana gazeto:

D. Simeonov klarigas, kiel nun staras la demando.

Post multe da diskutoj kaj proponoj la kongreso decidas, ke la Centra Komitato esploros plue la grundon por fondo de komuna Balkana Gazeto kaj ke ĝi havos mandaton solvi la demandon en tia aŭ alia senco (prop. Aktarĝiev).

La kongreso tamen trovas, ke tia gazeto estus tre dezirinda.

Estas akceptita la propono de D. Simeonov laŭ kiu dum tiu ĉi jaro ĉiu membro de B. E. S. ĉe la pago de sia jarkotizo devos doni krome 5 levojn por subteno de la oficialaj institucioj (Konstanta Reprezentantaro).

La kongreso ŝarĝas la C. K-on aranĝi dum la societa jaro esperantan loterion.

La kongreso aplaŭde decidas fari fondon por helpi per ĝi fremdajn samideanojn kiuj venos Bulgarion por serĉi laboron kaj restos sen rimedoj (prop. Nenkov).

La C. K. estas ŝarĝita aranĝi kaj prizorgi tiun ĉi fondon.

La kongreso danke rekonas la prudentecon de la plimultego de la junuloj, preferantaj ne disiĝi de la komuna organizajo B. E. S., kaj rezolucias alvoki la Esp. junularon en Bulgario ke ĝi aliĝu al B. E. S. por plifortigi ĝin kaj per tio akceli la triumfon de nia kara ideo (prop. G. Gunĉev).

La kongreso krome decidas:

peti la Ministron de la Popola Instruado, ke liaj organoj ne malhelpu la disvastiĝon de Esperanto en la lernejoj kaj ne embarasu la esp. lernantajn grupojn (prop. Spasova);

rekomendi al ĉiuj bulg. esperantistoj nepran portadon de la esp. insigno — la verda stelo;

ke la Kontr. kaj Centra Komitatoj (3 kaj 7 personoj) konsistu nur el loĝantaj en Sofio esperantistoj — (pro kaŭzoj teknikaj).

Post longaj diskutoj la propono pri ŝanĝo de la statuto ensenco, ke la sekretaria ofico estiĝu kostanta, estas malakceptita.

3. Labora kunsido (29. VIII. 1924. atgm.).

La kongreson ĉeestas kaj salutas la direktoro de la loka knaba gimnazio, oficiale reprezentanta la Ministerion de la Publika Instruado. Li per varmaj vortoj elmontras la konsideron de la nuna bulg. registaro al esperanto.

La kongreso deziresprimas, ke denove estu enkondukita Esperanto en la mezlernejoj.

Estas elektita kiel bulgara reprezentonto en Arad (Rumanio) s-ro G. Aktarĝiev.

La kongreso, pridiskutante aparte ĉiun paragrafon, akceptas jenan buĝeton por la societa jaro 1924/25:

Enspezoj:

§ 1.	Profito de la revuo	10.000 lv.
§ 2.	De membrokotizoj	12.000 "
§ 3.	De eldonajoj	42.000 "
§ 4.	Kongreskotizoj	7.000 "
§ 5.	Fondo „kongresaj aranĝoj"	7.000 "
	Sume	78.000 lv.

Elspezoj:

§ 1.	Kancelario	12.000 lv.
§ 2.	Lupago de ejo	12.000 "
§ 3.	Oficaj salajroj	42.000 "
§ 4.	Kongr. aranĝoj	7.000 "
§ 5.	Diversaj (propagando k. a.)	5.000 "
	Sume	78.000 lv.

La kongreso unuanime akceptis jenan deklaracion (prop. G. Aktarĝiev):

1. Ke la Bulg. Esp. Societo kaj ĝiaj membroj restas fidelaj al la principoj de la neŭtraleco kaj ke ili aliĝas al la deklaro de la kongreso en Bulogne sur Mer.

2. Ke B. E. S. estas pure kultura organizaĵo.

En la nova estraro estas elektitaj:

Centra Komitato: G. Aktarĝiev, At. D. Atanasov, Pan. Kolev, Lidia Ŝiŝmanova, Dim. Simeonov, Iv. Dobrev, Boris Panĉev.

Rezervaj membroj: St. Nenkov, Kiro Georgiev.

Kontrola Komitato: Kiro Georgiev, Z. Zaĥariev kaj Najden Vasilev.

— La venontjaran kongreson invitas la urboj Sofia, Varna, Vraca; post voĉdono, kiel urbo de la XII estas elektita Sofia.

Kiel honoraj membroj de B. E. S. estas aplaŭde proklamitaj s-roj Henriko Fiŝer, pastro Andreo Ĉe, Nikola Ŝiŝeĝiev (el Sofio) kaj Vasil Gaŝevski (el B.-Slatina).

Pastro G. Hristov, al kiu la Bulg. Eklezio ne permesis fari meson ĉe la malfermo de la kongreso, legas belan referaĵon, en kiu li substrekas la noblecon de nia ideo kai ligas ĝin kun la ideo de la kristanismo.

La kongreson fermis per kuraĝigaj vortoj s-roj Aktarĝiev, Ĵeljazkov, At. D. Atanasov, Kiril Jotov.

Презъ октомврий навредъ въ градове и села курсове и сказки!

Al Ruse.

— Holla, he, ĉu ankaŭ vi?

— Ho jes, sed kie restis la ceteraj karuloj?

Ni kolektiĝis en kaj ĉirkaŭ la vagonoj destinitaj por ni — por la beataj pilgrimontoj al nia nova Jerusalemo.

La Sofia stacio zumis pro la gajaj ekkrioj kaj ekscititaj paroloj de la verdstelanoj. Mi unuafoje estis vizitonta Esperantan kongreson, kaj en mia animo jubilis la antaŭsento pri io bela, grandioza.

La vagono, en kiu mi trovis loketon, estis pure esperantista.

La nokto jam progresis, venis la tempo de la ekveturo. Fine la vagonaro muĝe ekmoviĝis, eksonis lasta adiaŭo — ni jam estis survoje.

Ĉio ŝajnis al mi iel nereala, sonĝa, sorĉa ... La preskaŭ nerompeblaj baroj, kiujn mi renkontis volante partopreni nian kongreson en Ruse, kaj kiujn mi tamen rompis per mia esperanta volo, ŝajnis nun al mi kiel tempesta oceano, kiu kun senhelpa malico minacas min, la saviton. Mi tamen timetante ĉirkaŭrigardis, ĉu eble la vagonaro ne haltus aŭ returniĝus ...

Feliĉe ni postlasis stacion post stacio kaj nia esperante gaja humoro restis lumanta en la nokto.

Kantoj, ŝercoj, improvizitaj ludoj kaj petolado komuna. Ĉia ĝeno malaperis, regis familia intimeco.

Ĉe grandaj kaj etaj stacioj grupe aliĝis novaj samideanoj. Ni bedaŭrinde devis rifuzadi akcepti ilin en nia vagono, ĉar ĉe ni delonge jam mankis loko libera. Iom post iom la tuta vagonaro ricevis verdan koloron. La kongresanoj formis grupojn kaj grupetojn. Malnovaj amikoj aŭ konatuloj renkontiĝis, interjekciante salutis sin, manpremis.

Sur la stacio G.-Orjahovica samtempe alvenis du vagonaroj: la nia, kaj tiu el Suda Bulgario. Oni kompozis ambaŭ vagonarojn kaj en longa karavano ni nun veturis al Ruse. Sur multaj vagonfenestroj flirtis la verdaj flagoj. Belaspekto, kiu ĝojvibrigus ĉies koron esperantistan.

Fine ni proksimiĝis la celon de nia pilgrimado. La larĝega rubando arĝenta de la majesta Danubo blindige brilis en la tagmezo kaj elvokis la admiron de ĉiu el ni.

Sur la unua stacio de Ruse ni rimarkis nenion eksterordinaran. Tamen jen — aperis deputacio, kiu sciigis al ni, ke nin oni atendas ĉe la tria, ĉehavena stacio.

Efektive, ĉe la nomita stacio la tuta riverbordo nigris pro la granda amaso de renkontantoj. Ĉe la ekhalto de la vagonaro militista muzikistaro ekludis la himnon. Ni elvagoniĝis kaj nin miksis kun la renkontantoj.

Mi estis antaŭe leginta multe da priskriboj de okazintaj esperantaj kongresoj, kaj tamen ĉio aspektis por mi tiel freŝenova, kaj neordinara, kaj solena ...

Tie ĉi nin atendis ankaŭ la fremdaj gastoj — la rumanoj kaj la ĉina profesoro. Mi kun grandaj okuloj aŭskultis ilian parolon kaj parolmanieron, kaj ilia frapante belsona, sonora elparolado ĉarmis miajn orelojn. Pastro Ĉe, kaj Kenn, kaj Fiŝer, kaj Morariu... Kvazaŭ freŝa, aromplena blovo el ekzotika, mistera ĝardeno.

Saluton, saluton . . .

Mia koro batis.

— — Ni procesie ekmarŝis al la urba centro. La sonoj de l'muziko militista skuis la vibrantajn animojn. Mi ricevis la impreson, kvazaŭ ni konkeris — pace batalinte — ian promesitan Kanaanon.

Haalt! Granda tolrubando baris nian vojon: akceptejo. Denove salutoj, resalutoj. Ni eniris la vastan salonon de restoracio. Ĝi tuj ricevis la belan verdan koloron. Kvazaŭ sorĉisto per vergo mirakla eksvingis.

Mi, lacega pro vojaĝo kaj ekscitiĝoj, enhoteliĝis por iom ripozi. Por la sama vespero estis anoncita la interkonatiĝa vespero kaj ja mi volis nepre ne preterlasi ĝin.

Ho, la vespero interkonatiĝa . . . ĉu iu ĉeestinto ĝin forgesos? Mi certe scias ke mi neniam tiel bone amuziĝis kiel dum ĝi.

La verda bonhumoro de s-ro Fiŝer neelĉerpeble torentis kaj infektis nin ĉiujn. Poeziplene kaj modulite la juna Morariu majstris la vorton, kaj profunde, tranebule sonis la voĉo emocia de D-ro Kenn, kvazaŭ anoncanta misteron de fora, sorĉa lando.

Mi ne scias, ĉu kun ĉiu novulo okazas la samo, sed veninte en senpera kontakto kun homoj el proksimaj kaj malproksimaj regionoj de nia Tero, mi estis kaptita de iela „kosma" sento. Ion similan, kvankam certe en pli granda grado, oni trasentas meditante pri la senlimo de la Tutmondo: oni sin sentas preskaŭ svenanta, la animo preĝas en admiranta ekstazo, la tuta homa estaĵo kuniĝas kun la universo.

Tiuj sentoj fortege skuis min kaj ili febrige ekscitadis kaj efikis sur mia estaĵo ankaŭ poste dum mia restado en la por mi unua „fabela urbo de la mirakloj".

Sofia. A. G.

Salutparolado dum la Viena kongreso.

Karaj Samideanoj,

Kore salutas la Bulgara Esperanta Societo la kongreson. — Oni diras ĉiam: „Bulgarujo — lando de rozujo". Jes! Certe!..... Tamen la rozoj floras nur unu fojon — dum Majo, — sed la dornoj restas!..... Inter tiuj dornoj, brave kaj sindone, marŝas nia anaro bulgara, ĉiam antaŭen, ĉar por ili Esperanto estas kiel fenestro malfermita je la tutmondo.

Do, kresku, floru Esperanto kiel rozujo — dum Majo en Bulgarujo!

Lidia Ŝiŝmanova.

Събирайте усилено нови абонати! Отъ това зависи подобрението на списанието и по-честото му излизане!
Всѣки български есперантистъ трѣбва да се абонира непременно за „Bulgara Esperantisto“.

Teŝrini Evvel.*)

Alvenos Oktobro —
kun larmaj okuloj de kara knabin'
kaj kun la enuo post trinko de vin',
post ĝoja malsobro . . .

Mi scias ke venos
mem morto sub ĝia orflava mantel' . . .
Ĝin donu, venena Teŝrini Evvel —
la morton mi benos.

Malvarmon, mi scias,
alportos la vento aŭtuna al kor',
kaj tie forvelkos la lasta belflor',
sed: venu! — mi krias.

Alvenu kaj sternu
orflavan mantelon, Teŝrini Evvel,
sur vojon de l'vivo, de l'morto kaj de l'
memor' — por eterne!

Varna. Miti.

Изплатете незабавно абонамента си. Въ началото на годината дружеството има най-голѣма нужда отъ пари.

Stella Morbili.

Jasmeno kaj tilio floras.

Al Hanso.

Miksitaj odoroj portatas tra l'aero; miksitaj sentoj bolas en la koro. Ne regas paco kaj homamo, sed odoras je jasmenoj; ne ĝojas, sed suferas la homaro, tamen aromas je tilioj.

Iam Dio vidis infaneton en basko de milda partino kaj apude geknabojn, kiuj kisis unu la alian en feliĉo, kiel veraj kunĝemeloj. Kaj pro kontenteco kaj amo ekridetis la senmorta Dio — tiam aperis la jasmenoj.

Alifoje, promenante tra la paradizo, sama Dio vidis viron, kiu plugis la teron gaje kantante, kaj virinon, kiu kolektis florojn, aŭskultis najtingalojn kaj feliĉe ridetis, flustrante:

— Dank' al Dio-Amo mi sentas bonkorecon kaj nevenkeblan forton plibeligadi la vivon kaj prudentigi la mondon.

*) Teŝrini Evvel — nomo de la monato oktobro.

Sinjoro Dio ekridetis pro feliĉo kaj ĝojo — tiam aperis la tilioj.

Nun jasmenoj floras, sed je malamo, hipokriteco kaj malfeliĉo odoras; nun ankaŭ tilioj floras, sed je malpaco, sango kaj kadavro odoras.

Flugas laboremaj kaj nelacigeblaj abeletoj de floro al floro kaj zumas:

— Tamen povas esti amo, kaj sincereco, kaj paco, kaj feliĉo inter la homaro.

Kaj sopiras la homo kun koro de miksite bolantaj sentoj — sopiras kaj premas pugnojn, kvazaŭ en ili ĝi tenas la belon, la liberon kaj la ĝojon.

Floras jasmenoj kaj tilioj!

Varna, 27. VI. 1924.

Veko

al d-ro Zamenhof

Ho vekiĝu, vi dormantaj fratoj,
en mallumo nigra de l'malvero;
jam aperis stelo dezirata
kaj heliĝis sur la sanga tero.

Dormis ni, ni estis blindaj tute,
vivis ni la vivon de l'ĉagreno,
sed ni plu ne estu surdaj, mutaj,
ĉar ni vidas, scias kaj komprenas.

Jen en frata sang' la tero dronas,
la krimuloj sidas en palacoj
de kranioj, sur tiranaj tronoj
kaj dissemas ĉie la malpacon.

Ho, sufiĉe ni katenojn trenis,
ni eterne, fratoj, ne suferu
jen la dezirita horo venis,
ĉar pleniĝis glaso de l'tolero.

Ekribelu, palaj nigraj sklavoj,
kaj disrompu vire la ĉenerojn,
armu vin per la brilantaj glavoj
de la sankta emo je libero.

Morte grincas sanga kaj perfida
la malnova mond' en veaj krioj.
Mi invitas vin al lukt' decida,
nu, ekstaru vigle, fratoj miaj!

Jam sufiĉe ĝemoj kaj turmentoj,
forgesita estu viv' sufoka,
En la mondon venis nova sento
tra la mondo iras forta voko.

Zahari Zahariev.

La problemo pri internacia lingvo.

La bone konata al la bulgaraj esperantistoj S-ro Henriko Fiŝer el Bukureŝto, dum la Rusĉuka kongreso rakontis interalie la sekvantan spritan historieton:

En Jugoslavio grupeto da junaj geesperantistoj veturis ekskurse per vagonaro. Ili gaje babiladis inter si en esperanto. En la sama vagono veturis simpla serba vilaĝano, kiu kun intereso aŭskultis ilian paroladon kaj fine demandis:

— En kia lingvo vi parolas? Ĉu en itala?

— Ne, avo, ni parolas en esperanto.

— Esperanto? Kia do estas tiu lingvo?

— Tio estas lingvo facila, kiun povas ellerni ĉiu homo, ankaŭ la ne tre multe instruitaj. Ĝi estas destinita por servi al la homoj, kiam ili rilatas kun homoj el aliaj nacioj, kies lingvon ili ne komprenas.

— Eh, dankon al Dio! interjekciis la maljunulo kaj signis krucon. — Mi ĝisvivis fine aŭdi ankaŭ tion.

La kompanio kun intereso observis la miron de la maljuna simpla vilaĝano. Post paŭzo li daŭrigis:

— Ĉu vi scias, ke mi ofte pensis pri tia afero, ke ekzistu tia lingvo, en kiu la homoj de diversaj nacioj povus interkompreniĝi?

Проблемътъ за международенъ езикъ.

Добре познатиятъ на българскитѣ есперантисти г. Хенрихъ Фишеръ отъ Букурещъ, презъ време на Русенския конгресъ разправи между другото и следната духовита историйка:

Въ Югославия една групичка млади есперантисти пѫтувала на екскурзия съ тренъ. Тѣ весело си бъбрѣли помежду си на есперанто. Въ сѫщия вагонъ пѫтувалъ единъ простъ сръбски селянинъ, който съ интересъ слушалъ говора имъ и най-сетне запиталъ:

— На какъвъ езикъ говорите? На италиянски ли?

— Не, дѣдо, ние говоримъ по есперанто.

— Есперанто? Че какъвъ е този езикъ?

— Това е единъ лесенъ езикъ, който може да се изучи отъ всѣки човѣкъ, дори и отъ не много образованитѣ. Той е предназначенъ да служи на хората, когато се сношаватъ съ хора отъ други народи, чийто езикъ не разбиратъ.

— Е, слава Богу! възкликналъ старецътъ и се прекръстилъ. — Доживѣхъ най-после да чуя и това.

Компанията съ интересъ наблюдавала очудването на стария простъ селянинъ. Следъ кратко мълчание той продължилъ:

— Знаете ли, че азъ често съмъ мислѣлъ за такова нѣщо, да има такъвъ езикъ, на който хората отъ разни народи да могатъ да се разбиратъ помежду си?

Ha! Jen al vi okazo! Nun la kompanio estis vere mirigita. Leibnitz, Commenius, kaj tiom da pensuloj en la pasinteco ĝis niaj tempoj venis nature al tiu penso — tio ja estas facile komprenebla, ĉar ili havis tre vastan intelektan vivon kaj sentis la internaciecon de tiu vivo kaj la baron, kiun kaŭzas al ĝi la multlingveco. Sed tiu ĉi simpla kamparano? Per kiu vojo li trafis tiun ĉi problemon?

— Kio do donis al vi kaŭzon pensi pri tia lingvo? demandis unu el la junaj ekskursantoj, ne sen ŝercemo en la voĉo.

La maljunulo rakontis jenon:

— Mi estas malgranda vaganta komercisto kaj vizitas konstante vilaĝajn foirojn en Jugoslavio, en Bulgario, en Rumanio, en Hungario, en Aŭstrio . . . eĉ ĝis Saloniko mi estas irinta. Mi iras ĉiam kun mia malgranda azeneto, kiu portas mian komercajon. Ĉie, kie mi estis, mi trovis homojn, kies lingvon mi ne komprenis kaj kiuj min ne komprenis. Sed mi rimarkis ĉiam, ke mia azeneto, renkontante fremdlandajn azenojn, tuj ekflaras ilin kaj komencas ian interparolon kun ili. Ĝi povas interkompreniĝi kun ĉiuj azenoj en ĉiuj landoj. Kaj en mian kapon venis do la penso, ke ni, la homoj, kiuj inter fremduloj ne povas interkompreniĝi per homa parolo, ni estas pli grandaj azenoj ol la azenoj!

А! Ето ти тебе! Сега компанията била наистина удивена. Лайбницъ, Коменски и толкова мислители въ миналото до наши дни сѫ дохаждали естествено до тази мисъль — но това може да се разбере лесно, защото тѣ сѫ имали тьрде обширенъ интелектуаленъ животъ и сѫ чувствували международностьта на този животъ и пречката, която му причинява многоезичието. Но този простъ селякъ? По кой пѫть той се е натъкналъ на този проблемъ?

— Ами какво ти даде поводъ да мислишъ за такъвъ езикъ? запиталъ единъ отъ младитѣ екскурзиянти, не безъ шеговитость въ гласа.

Старецътъ разказалъ следното:

— Азъ съмъ дребенъ пѫтующъ търговецъ и посещавамъ постоянно селски панаири въ Югославия, въ България, въ Румъния, въ Маджарско, въ Австрия . . . ходилъ съмъ дори до Солунъ. Азъ ходя винаги съ малкото си магаренце, което ми носи стоката. Всѣкжде, дето съмъ бивалъ, намиралъ съмъ хора, чийто езикъ не съмъ разбиралъ, па и тѣ не сѫ ме разбирали. Но азъ съмъ забелѣзвалъ винаги, че моето магаренце, като срещне чуждестранни магарета, веднага ги подуши и почва нѣкакъвъ разговоръ съ тѣхъ. То може да се разбира съ всички магарета отъ всички страни. И въ моята глава дойде, значи, мисъльта, че ние, хората, които между чужденци не можемъ да се разберемъ съ човешки говоръ, сме по-голѣми магарета отъ магаретата!

Отъ 2 ноемврий почва пропагандната седмица. Гответе се отъ сега.

Esperanto-Movado.

Enlanda.

Sofia. — La regulaj kunvenoj de la Sofia sekcio okazas ĉiuvendrede. — La Sofiaj esperantistoj havis plezuron gastigi fremdajn samideanojn: Ges-roj Naghi el Ujpeŝto (Hungario), kiuj restos kaj loĝos en Sofio, s-ro Schnützer et Lwów (Polio) kaj s-ro Albert el Le Man (Francio), kiuj lastaj forveturis al Konstantinoplo.

— La sekcio de Poduene (orienta parto de Sofio) malfermis kurson en sia kvartalo. La kurson gvidas s-ano Najden R. Vasilev.

— La 7-an de septembro okazis ĝenerala jara kunveno de la Sofia sekcio en la Universitato. Laŭ la raporto, dum la jaro la sekcio aranĝis 3 kursojn por geurbanoj (2 longaj kaj 1 demonstracia de nur 3 lecionoj), 2 publikajn prop. kunvenojn, kaj pli ol 40 semajnajn kunvenojn. En la lastaj estas legitaj referaĵoj, artikoloj el la esp. gazetoj kaj libroj; estas diskutitaj organizaj demandoj; estas luditaj esp. ludoj. La enspezo de la sekcio dum la jaro superis 14,000 lv. La sekcio aranĝis 2 ekskursojn. La kunveninoj priparolis la estontan agadon por esperanto en la ĉefurbo, akceptis vicon da konvenaj decidoj kaj elektis novan estraron de la sekcio en konsisto: Konstantin Kirkov, Nisim Ronkov kaj Toma Janiŝliev, kaj kontrolan komitaton, en konsisto: Boris Pančev kaj F-ino Mara Zafirova.

— Vendrede, la 12. de Septembro la hungara samideano Naghy (nun loĝanta en Sofia) referis antaŭ la Sofiaj samideanoj je temo „Du simboloj de la pasinta jarcento“.

La kunveno estis kontentige vizitita.

Karlovo. — Krom la ekzistanta ĉi tie gelernanta Esperanto-Societo „Ni venkos!“ oni fondis ankaŭ geurbanan esp. grupon. La stariga kunveno okazis je la 31. VIII. en la noveluita esperanto-klubo sur la placo „Levski“, kie post la parolado de samideano Cv. Cvetkov oni decidis fondi tian grupon, kiu aliĝu al B. E. S. En plej baldaŭa tempo la grupo aranĝos publikajn propagandajn paroladojn, malfermos vesperajn kursojn. La gemembroj fondintoj estas 21. En la sama kunveno oni elektis provizoran komitaton: Prezidanto: G. D. Patamov (malnova esperantisto); sekretario-kasisto: Cv. Cvetkov kaj bibliotekisto: Iv. Astarĝiev.

La adreso de la grupo estas: Esperanto-Klubo en Karlovo.

— La gejunula esperanto-societo „Ni Venkos!“ prepariĝas por sia jubileo — la dekjara datreveno de ĝia fondo. Ĉion koncernantan la societon oni adresu: Esperanto-klubo — por „Ni venkos“.

Esperanto inter vegetaranoj.

Estas jam konate ke nia lingvo estas tre disvastigita inter la vegetaranoj en nia lando, ke unu granda procento de la adeptoj de vegetarismo ne nur parolas, sed uzas kaj propagandas

fervore Esperanton. Konataj estas la rezolucioj alprenitaj en vegetaranaj kongresoj pri Esperanto.

Dum la lasta vegetarana kongreso, sesa, okazinta en Plovdiv de 31. Aŭgusto ĝis 2. Septembro, partoprenita ankaŭ de sinjoro Valentin Bulgakov, ekssekretario de Leo Tolstoj, okazis fakkunveno de vegetaranoj esperantistoj. En tui ĉi kunveno oni pridiskutis la demandon pri la eldono kaj disvastigo de la organo „Vegetarano“, kiu estonte estos presata en Sofia, kaj decidis proponi al la kongreso la jenan rezolucion:

„La Sesa kongreso de Bulgara Vegetarana Asocio, okazinta en Plovdiv de 31. VIII. — 2. IX. 1924, konsiderante:

1. ke la ligo inter la vegetaranaj asocioj en la apartaj landoj, unuiĝintaj en la Internacia Vegetarana Unuiĝo, estas, dank' al la grandaj lingvaj malfacilaĵoj, tre malforta;

2. ke pro tiuj ĉi lingvaj malfacilaĵoj la Unuiĝo ankoraŭ ne povas havi propran oficialan presorganon;

3. ke, aliflanke, la internacia lingvo Esperanto estas tre disvastigita inter la adeptoj de la vegetarismo en Bulgario;

4. ke la vegetaranoj parolantaj esperanton tre sukcese propagandas la ideon de la vegetarismo internacie, ke ilia organo „Vegetarano“ jam fakte estas internacia vegetara revuo, kiu trovis grandan apogon ĉe la bulgara vegetaranaro;

rekomendas al la estraro de la Internacia Vegetarana Unuiĝo:

a) ke ĝi rekomendu al siaj membroj la alprenon kaj plej vastan uzadon de tiu tre praktika internacia komprenilo — la lingvo esperanto — en rilatoj kun samcelanoj parolantaj aliajn lingvojn, por tiamaniere fortigi la ligon inter ili, kio estas tre necesa por unu organizita rezisto kontraŭ la atakoj de la perforto;

b) ke ĝi akceptu oficiale kiel sian oficialan presorganon, la gazeton „Vegetarano“, kiu gazeto plej bone povus servi al la diskonigo de la Unuiĝo mem“.

Tiun ĉi rezolucion la kongreso unuanime akceptis per aplaŭdoj.

La novefondita koopera eldonejo, kiu eldonos „Vegetaranon“, eldonos ankaŭ dum tiu ĉi jaro kelkajn el la popolaj rakontoj de Leo Tolstoj en esp. traduko.

Alilanda.

Голѣми успѣхи въ радиотелофона.

Недавна бѣше съобщено, че голѣмата американска радиотелефонна лига (American Radio Relay Ligue), която има повече отъ 15.000 членове, се интересува отъ международния езикъ и проучва въпроса за възприемането на такъвъ езикъ. Благодарение на добритѣ събрани сведения за голѣмото разпространение на Есперанто и за употребата му въ радиотелефона въ последно време, казаната лига окончателно е възприела Есперанто за международенъ езикъ и е решила

да го препоръчва на Международния Съюзъ на Радиолюбителитѣ, чийто конгресъ ще се състои въ Парижъ, 1925 год.

Сжщо така едно отъ най-голѣмитѣ радиосписания въ Америка, което излиза въ Ню-Йоркъ и има 300.000 читатели, е възприело за международенъ езикъ въ радиотелефона Есперанто и помѣства въ колонитѣ си сведения и статии за езика, препоржчвайки го на своитѣ многобройни читатели.

Всѣки български есперантистъ трѣбва да се стреми да запише поне единъ новъ абонатъ. Така скоро списанието ни ще се развие и подобри.

Libroj kaj gazetoj.

Libroj.

Oficiala Almanako de la „Tutmonda Polica Ligo“ kaj de la „Tutmonda Ligo de la Ordo“. Redaktis A. H. de Marich. Budapest, 1924. Prezo 59 usonaj c e n t s. Mendebla de „La Policisto“, Budapest, IX, Üllöi-ut 59, IV. 8., Hungario.

Kiu interesiĝas pri la organizita esperanto-movado inter la policanoj kaj aliaj fakanoj, trovos abundan materialon, bone kaj klarvideble aranĝitan en tiu volumo. Sepdek portretoj de policistoj-esperantistoj kaj de esperantistaj-policistaj grupoj ornamas la libron.

Laŭroj. De A. Kuprin. Et-formata, 10-paĝa, eld. „Esperanto“, P. Hitrov, Berlin. Nomo de trad. kaj vendoprezo nemontritaj.

La bela, trankviltona noveleto meritis tradukon. Ĝi memorigas pri la Storm'aj noveloj kaj ankaŭ la Andersen'an manieron de fabelado. Tre leginda.

Signalo. De V. Garŝin, 29-paĝa, formato, eldono, trad. kiel supre.

Kortuŝa rakonto el la vivo de la fervojistoj. Garŝin, majstra novelisto, estas ĉe ni bone konata per siaj „Kvar tagoj“, „Ruĝa floreto“ k. a.

La traduko de ambaŭ noveloj estas bona, sukplena, kelkfoje tamen la orelon gratas la uzo de iu, u n u. Kelkaj rusismoj. Krome: k o m e n c i s, t e m p e, h e j t l i g n o j anst. komenciĝis, kelktempe, hejtligno; „la staciestro o k a z i s (случи се, излѣзе) oficiro de lia regimento“.

A. G.

„Bulgara Esperantisto“ е най-евтиното списание въ България.

Sciigoj. — Известия.

De la Societo.

— Въ заседанието си, станало на 3. септемврий т. г., централниятъ комитетъ се конституира така: председатель Г. Актарджиевъ, подпредседатель — Ат. Д. Атанасовъ, секр.-касиеръ — Пан. Ат. Колевъ, библиотекарь — Б. Панчевъ, членове: Л. Д-ръ Шишманова, Д. Симеоновъ и Ив. Добревъ.

Редакционенъ комитетъ: Ат. Д. Атанасовъ, Д. Симеоновъ, Зах. Захариевъ и Асенъ Григоровъ.

— En sia kunsido, okazinta la 3-an de Septembro j. k., la Centra Komitato konstituiĝis jene: prez. — G. Aktarĝiev, vicpr. — At. D. Atanasov, sekretario-kasisto — P. At. Kolev, bibl. — B. Panĉev, membroj — L. D-ro Ŝiŝmanova, D. Simeonov kaj Iv. Dobrev.

Redakcia Komitato: At. D. Atanasov, D. Simeonov, Zaĥ. Zaĥariev kaj Asen Grigorov.

— Централниятъ Комитетъ, вследствие получени запитвания отъ дружествени членове, известява: поради това, че издаването на „Balkana Revuo" изглежда, че не ще се осжществи поне презъ близкитѣ месеци и понеже „Bulgara Esperantisto" до като се получатъ повече абонаменти ще се издава единъ пжть месечно — второ платено лице не ще се назначава, до като не се окаже нужда.

— Съгласно чл. 27, т. 43 отъ новия Законъ за гербовия налогъ „карти легитимационни и книжки, издавани отъ разни дружества, удостовѣряващи само факта, че носителитѣ имъ сж членове на тия дружества" се облепятъ съ гербова марка отъ три лева. Възъ основа на това касиеритѣ на секциитѣ ще трѣбва да обгербоватъ всѣка издавана членска карта, като гербовия сборъ събиратъ отъ членоветѣ.

De la Sekretario-Kasisto.

— Секретаритѣ на групитѣ, при поржчване чл. карти и марки, да вcovматъ грижата да събиратъ и изпращатъ освенъ членски вносъ и по 5 лева за всѣки членъ — годишна вноска на дружеството въ касата на Konstanta Reprezentantaro (K. R.).

— Адресътъ на дружеството, до второ съобщение, остава сжщия. За избѣгване на затруднения, всичко, особено записитѣ, да се адресира: Българско Есперантско Дружество, ул. Витошка, 48 — София, безъ да се прибавятъ каквито и да е други имена (председатель, касиеръ и пр.).

— Членскитѣ карти важатъ само за една дружествена година. Тѣ иматъ и статистическо значение за дружеството. Групитѣ не могатъ по свое усмотрение да смѣняватъ нумерата и годината, поставени отъ друж. секретарь. Ако нѣкои групи иматъ останали неизползувани чл. карти отъ миналата година и не желаятъ да понесатъ загуба съ тѣхното унищожаване — да ги пратятъ веднага въ дружествената канцелария. Срещу тѣхъ ще имъ се пратятъ такива съ №№ отъ настоящата година.

Неизползуванитѣ марки сѫ валидни и за тази година.

— По решение на Ц. К. и презъ тая година за пропагандичната („зелена") седмица дружеството ще отпечата афиши подобни на миналогодишнитѣ, които ще разпрати на групитѣ. Нашата седмица е първата отъ м. ноемврий. Желателно е въ най-скоро време всѣка група да изпрати до канцеларията на дружеството известна сума, за да подпомогне издаването на пропагандическитѣ афиши. Съ това всѣка група на низка цена ше има достатъчно количество афиши, а такива ще иматъ възможность да получатъ и слабитѣ финансово групи или единични съидейници.

Сѫщо и ако нѣкой има известна идея за дейностьта ни презъ време на пропагандичната седмица, да я съобщи.

De la Redakcio.

— Ако искате „Bulgara Esperantisto" да стане поне полумесеченъ, незабавно изпратете абонамента си и се погрижете да запишете поне единъ новъ абонатъ.

— Желателно е, всички групи, при събиране членскитѣ вноски, да записватъ всѣки членъ и за абонатъ на „Bulgara Esperantisto", като абонаментитѣ се пращатъ вкупомъ и заедно съ списъка на абонатитѣ. За това нѣкои групи иматъ вече решение.

Diversaj.

— S-ro Kapitano Stefan Radev donacis al la Societo ŝrankon, por la biblioteko. Dankon pro la valora donaco!

— At. D. Atanasov sciigas al la samideanoj, kiuj turnas sin al li per diversaj demandoj, ke li bedaŭrinde ne povos respondi al ĉiu letero pro manko de sufiĉa libera tempo, malgraŭ sia granda deziro servi laŭpove al ĉiuj samideanoj. Oni pardonu lin kaj volu turnadi sin al la societo.

— S-o Iv. H. Krestanov, konata nia samideano, kiu loĝis en Germanio, revenis jam sian patrujon kaj ekloĝis en sia naskurbo Pirdop. La preparita de li Bulgara Antologio en esperanto estas jam sub presado kaj aperos post du monatoj.

Много по-голѣма цена ще има за чуждестранния ви кореспондентъ да получи единъ брой отъ „Bulgara Esperantisto", отколкото една илюстрована пощенска карта.

Н. К.

До Госпожица

Никола Коцевъ

Рахово

Niaj mortintoj.

Lastatempe nia movado perdis la senlacajn pionirojn por nia ideo:

JOSIF JOSIFOV
drogisto en Sofia, membro de la Sofia sekcio de B. E. S.

DOJKO T. BOJUKLIEV
el Karlovo, kasisto de la gelernanta societo „Ni venkos" en la sama urbo.

F-ino KATJA HRISTODOROVA
el T.-Pazarĝik, instruistino en Peŝtera.

S-ino MARA PASKALEVA
el Tirnovo, membrino de la tiea grupo „Lumo", mortinta en Sofio post operacio.

Eternan pacon!

Открива се подписка за VI. годишнина на сп.

„Bulgara Esperantisto"

Годишенъ абонаментъ 30 лева.

И презъ VI-тата си годишнина „Bulgara Esperantisto" ще даде 12 печатни коли на читателитѣ си, при сжщия размеръ както и до сега.

Записвания ставатъ направо въ дружеството или чрезъ мѣстнитѣ секции.

REDAKCIA KOMITATO:

Dimitr Simeonov. — Zahari K. Zahariev. — Asen Grigorov. — Atanas D. Atanasov.

Adreso de la redakcio: Sofio (Bulgario), str. Vitoŝka, 48.

София. — Печатница Б. А. Кожухаровъ. — Телефонъ 1894.